




Tarifon vidu sur lasta paĝo!

INTERNACIA KOMERCO

MONATA KOMERCA GAZETO DE ESPERANTO TRIUMFANTA



Redaktisto: H. J. Unger, Lausanne

Internacia Komercio.

Komerca parto troviĝas en ET jam depost la unua numero. Ni hezitis, regule okupiĝi pli vaste pri komercaj aferoj, ĉar plene sufiĉis al la Esperanta movado la „Internacia Komercia Revuo“, modele kaj lerte redaktita de nia agema samideano s-o Unger.

Inter ĉiuj gazetoj („Komercio per Esperanto“, „Export-Esperantist“ ktp.) tiu „Internacia Komercia Revuo“ estis certe la plej praktika kaj plej sukcesinta eksperimento... Por ne malhelpi ĝin, ET ne realigis sian ofte esprimitan ideon pri kreo de granda komerca gazeto. Nun IKR ne plu aperos. Kaj tial for estas ĉiuj obstakloj.

Publikigante la novan komercan revuon „Internacia Komercio“, ni intencas malfermi novan epokon de la Esperanta movado, kiun s-o Edmond Privat tiel trate nomis „novan paĝon de nia historio“.

IK vivas sur la bazo de ET, kaj tial ĝia unua numero povas esti presata jam en 5000 ekzempleroj, legataj tra la tuta mondo.

Ke IK trovu tutmondan apogon kaj ke ĝi, redaktata de profesia ĵurnalisto, la fondinto de IKR, helpu al kreo de serioza komerca movado — jen nia profunda deziro!

Internacia Konferenco.

Grava internacia konferenco staras antaŭ ni: Venezia.

Esperanto en komercio, industrio kaj turismo — jen ĝia celo.

Konferencoj estas nun modo en la mondo, certe, sed konferencoj pri Esperanto ne apartenas ankoraŭ al tiu tradicio.

Unuan ni vidis en Genève, lastan jaron. Ĝi traktis problemojn tre gravajn kaj multe fortigis la pozicion de Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. Tiu konferenco pri „Esperanto ĉe Lernejo“ estis eksperimento. Ĝia brila sukceso estis instigo por dua. Ke ankaŭ ĝi trafu la celon, ĉi estu la gvidanta ideo de nia pensado kaj la tasko de nia senĉesa agado!

Al UEA, kiu kunvokas tiun konferencon kaj, ne estante organizo de specialistoj, petis la kunlaboradon de nia faka gazeto, ni sincere dankas: ĝi montris per tiu faro, ke ĝi volas agi prudente, en la vera intereso de la movado, respektante la vivon de aliaj (fakaj) organizaĵoj kaj gazetoj. Tio estas ankaŭ bona argumento kontraŭ tiuj, kiuj konstante asertas, ke UEA estas „monopola“ kaj volas „engluti Esperantujon“.

Tre kontentaj ni estas, vidante tian konkordon inter Esperantistoj. Ĉar ni estas konvinkitaj, ke harmonia agado — sole — povos konduki nin al la celo.

La unuan numeron de IK ni komencas do sub favoraj kondiĉoj. Ni esperas, ke ili daŭru. Tio estus ne nur por la bono de ambaŭ, sed por la profito de la tuta movado!

Venezia

la urbo, kie okazos la komerca konferenco.

Pro sia karaktero, pro sia laguno, pro sia strukturo kaj pro sia ŝanĝiĝema koloro ŝuldira al la ŝanĝado de lumaj kaj akvaj refleksoj kaj al la fundo de sia laguno, Venezia prezentas fantaziajn vidaĵojn, kiuj donas al la marmoraj konstruaĵoj belegan aspekton plenan je mirindeco kaj kontentigo por inteligenta turistoj.

Venezia nombras preskaŭ 172 000 loĝantojn. La urbo malproksimiĝas 4 kilometrojn de la firma tero kaj 2 km. de la libera maro. Ĝi estas starigita sur 117 malgrandaj insuloj apartigitaj per 150 kanaloj kaj kunigitaj per 550 pontoj. La plej granda el ĉi tiuj kanaloj estas la Granda Kanalo (Canal Grande), kiu partigas la urbon je du malegalaj partoj.

La urba plano estas tute neregula: ĝi etendiĝas preskaŭ 4 kilometrojn je

Ekonomia situacio de Albanio.

La raporto de prof. Albert Calmès al la L. d. N.

Antaŭ kelka tempo la tuta mondo aŭdis konstante pri militaĵoj en malgranda lando, kies nomo estas ofte citita kun iom da rideto: Albanio. Tamen, tiu mokemo ne plu estas pravigebla, ĉar Albanio estas efektiva kaj modera membro de la Ligo de Nacioj. Ekonomie ĝi estas lando tre riĉa kaj multe ekspluatebla.

Ne apartenas al ni, diskuti pri politikaj aferoj, kaj tial ni sole juĝas ĉi-tie pri la ekonomia situacio de Albanio, konstatante samtempe, ke la laboremo de tiu progresema popolo promesas al ĝi felicitan estonton.

Albanio kaj L. d. N.

Oni scias, ke en junio 1922 la albana registaro petis la Ligon de Nacioj, delegi al Albanio finanĉan konsilanton kaj kelkajn teknikajn ekspertojn, por ke ili siudu senpartie la ekonomian situacion de la lando kaj la eblecon de ĝia evoluo. Per tia senpartia enketo kaj juĝo la registaro esperas alfluon de eksterlanda kapitalo, kiu, sub parte eksterlanda gvidado, forte helpos al ĝenerala evoluo de la lando.

La L. d. N., demandinte sian finanĉan komitaton, sendis al Albanio la luksemburgan profesoron Albert Calmès, kiu estas favore konata en la ekonomia sfero tutmonda. Post dumonata atenta studado, s-o Calmès prezentis al la Ligo sian detalan raporton, el kiu ni resume eliras la sekvantajn informojn.*

Ĝenerala situacio.

La interna politika stato de Albanio rimarkeble pliboniĝis kaj la registaro atingis bonegajn rezultojn en sia agado por pacigo kaj organizo. Sed la plej atentinda tasko estis la malmalrado de la popolo; ĝi tre bone sukcesis, eĉ en la monero, kaj sekureco ŝajnas nun regi.

Deĵtri jaroj de konstanta militado tre nature malhelpis ĉiun progreson kaj malriĉigis la popolon. Tamen, malgraŭ

* Por ricevi la originalan raporton, en franca aŭ angla lingvo, oni skribu al s-o Blinshi, albana delegito ĉe la L. d. N., en Genève, Hôtel de Russie.

longeco kaj 2,5 km. je larĝeco, ĝia perimetro estas ĉ. 11 km.

Venezia estas partigita je 6 Sestieri: San Marco (elp. San Marko), Castello (elp. Kastelo), Cannaregio (elp. Kanareĝo), S. Croce (elp. S. Kroĉo), S. Polo kaj Dorsoduro. Ĝi nombras 30 paroĥojn kaj 72 preĝejojn, kies plimulto estas naciaj monumentoj.

Por la plenkon de la urba karaktero estas rekomendinde trairi ĝin piede; sed ne volante aŭ ne povante tion fari, oni povas uzi vaporŝipetojn, kiuj suikas la lagunon de Lido ĝis la ekstremo de la Granda Kanalo, aŭ — oportune — la gondolojn (karakterizaj veneziaj akvoveturiloj).

Kelkfoje sufiĉas, ke la piediranto — pro sia orientado — sekvu la fluadon de la amaso; sed, kiam bezone, la venezianoj estas ĉiam volonte pretaj doni informojn kaj, ne malofte, akompani la malkertulon dum longa vojradado aŭ ankaŭ ĝis la celo. Kiam, kio tre ofte okazas, la postulanto ricevas la respondojn: lru ĉiam rekten!, oni devas sekvi saman direkton, ĉar en Venezia oni ne konsideras la angulojn aŭ la stratajn kruciĝojn, kiuj povus konduki al malĝusta vojo: ti-okaze estus plej bone peti informon.

militaj detruoj kaj banda rabado, Albanio eliris el la mond milito relative bonŝance, dank' al la persisto kaj natura prudento de la popolo, kiu absolute rifuzis akcepti eksterlandan papermonon, retenante oron kaj arĝenton. Tial Albanio estas unu el tiuj maloftaj landoj, kiuj havas ankoraŭ metalmonan cirkuladon sur efektiva ora bazo.

La ekonomia vivo estas ankoraŭ tre primitiva. Ĉiu penas produkti tion, kion li bezonas, escepte salon kaj

ekzistas 854 instruistoj kun 24 000 lernantoj. En la unuagrada lernejoj la instruado daŭras 6 klasojn; depost la 4-a klaso la lerno de fremda lingvo estas deviga. Laŭ plej nova leĝo, ankaŭ Esperanto, la internacia helpa lingvo, pri kiu favore okupiĝis lastatempe la L. d. N., estas en la programo de la pli altaj lernejoj. Da tiuj ekzistas 12 kompletigitaj lernejoj, 2 gimnazioj, 1 seminario kaj 1 agrikultura lernejo.

Estas do certe, ke la albano havas la volon, marŝi sur la vojo de la progreso. Sed ĉu ili ankaŭ estas sufiĉe laborema?

Profesoro Calmès citas tiun pruvon pri la laboremo kaj energio de la albana popolo: „Ĉirkaŭ 50 000 albanoj elmigris al Norda Ameriko; la plejparto, neinstruita, devis dediĉi sin al profesioj plej simplaj. Se mallaboremo regus ĉe ili, ili estus restintaj hejme!“

Vojoj.

La malmultaj vojoj, pri kiuj Albanio disponas, estas difektaj kaj neuzablaj por varena transportado, ĉar ili tre suferis dum la lasta milito. La sep gravaj vojoj havas longecon de ĉirkaŭ 500 km.; la lando mem mezuras de nordo al sudo 400 km., kaj de oriento al okcidento 100—150 km.

Pro la manko de bonaj vojoj suferas precipe la ekonomia vivo. Skutari eksportas siajn haŭtojn al Italio, kaj alia albana urbo, Argyrokastron, estas devigata provizi sin de tie. Por oliva oleo la afero estas kontraŭa: Valona eksportas oleon al Italio, kaj Skutari re-importas ĝin de ĝe. Estas fakto, ke la diversaj regionoj havas tre bonajn ŝipilatojn kun Italio, sed nenian komunikadon inter si mem!

Laŭ profesoro Calmès la vojoj urĝe necesal devus havi entutan longecon de 2 500 km.; ilia konstruado kostus proksimume 60 milionojn da orfrankoj.

Fervoja reto.

Normalajn fervojojn oni ne trovas en Albanio. Kio ekzistas, detruigis dum la mondmilito. La delegito de la L. d. N. proponas la konstruon de du ĉef- (Daŭrigoj vidu sur 2-a paĝo.)

Veneziaj festoj.

La veneziaj festoj, kiuj en la pasintaj jarcentoj estis multenombraj, malmultiĝis pro la ŝanĝo de la tempo, sed konservis ankoraŭ imponan karakteron.

Veglia del Redentore (redemptora noktunveno, 3-a julia dimanĉo). Miloj da ŝipetoj lumigitaj per malgrandaj lanternoj trasulkas la lagunon dum artaj fajrigadoj, kaj sur ili oni manĝas, kantas kaj sonorigas dum la tuta nokto, kaj poste, je tagiĝo, ĉiuj iros Lido'n por ĝui la imponan spektaklon de l' sunleviĝo.

Regata Reale (reĝa remkonkurso). Naŭ malsamkoloraj gondoloj, remataj de fortikaj gondolistoj, konkuris por flagoj kaj monopremioj dum la tuta irkaj revenado tra la Granda Kanalo.

Serenate e galleggiante (serenadoj kaj naĝanta festo). Grandaj barkoj kunigitaj kaj ornamitaj per multenombraj malsamkoloraj lanternetoj gasigas la tutan urban muzikistaron kaj kantistojn de la ĉefaj teatroj. Dum la akvoveturado tra la Granda Kanalo kaj la S-ta Marko-Baseno la muzika programo estas plenumata ĉe nekredibla popolamasa kunveno.

Dum tiaj festaj tagoj konvenas granda aro da fremduloj, kiuj poste forlasos la urbon elportante neforgeseblan memoron pri la sugestio, kiun povas estiĝi vene-

zia festo, kaj admiron por la venezianoj, kiuj per sia ŝerco, gracieco kaj bona sento montriĝas amegaj, spritaj kaj bonanimaj, kun sia dialekto karesema, harmonia kaj facila por ĉiu itala orelo.

Nomenklatureo.

Piazza (elp. placo): placo. Tiel nomata estas nur la Placo de S-ta Marko. Calle (elp. kale): strato. Ruga: strato flankita per butikoj. Lista: strato, kie antikve loĝis la ambasadoroj kaj kie oni ĝuis rajliberecon; do strato servinta kiel rifuĝejo. Sallizzata (elp. salicada): laŭ venezia dialekta verbo „salizar“, t. e. silikumi; ĉar ili estas la unuaj stratoj silikumitaj. Ramo: strateto, kiu disiĝas de ĉefa strato. Campo (elp. kampo). Ĉiu kampo distingiĝas per la puto, la preĝejo kaj la kolono, al kiu oni apogis la religiajn standardojn. Campiello (elp. kampjelo): malgranda kampo. Corte (elp. korto): placeto ĉirkaŭita per konstruaĵoj, kien oni eniras de komuna strato per unu strateto. Canale (elp. kanale). Tiel nomiĝas tri kanaloj: Granda Kanalo (Canal Grande) aŭ Canalazzo (elp. kanalaco), Canal della Giudecca (elp. ĝudeka)



Tirana, ĉefurbo de Albanio.

tabakon. Ĉiu familio kulturata sian propran terpecon, produktas siajn panon, viandon, linon, lanon kaj ledon, nutriĝante, hejman, vestigante kaj sin ŝuante per propraj rimedoj. Sed tio koncernas ĝenerale nur la albanan kamparon, kiu troviĝas ankoraŭ en civiliza stato tre primitiva.

Publika instruado.

La progreso dependas do, unualoke, de la kapableco de la popolamaso, alkiŝtimitiĝi al nova pli altaj bezonoj. Sed: ĉu la albano havas la deziron al progreso? Ĉu li aspiras al civilizado? „Mi ne hezitas respondi jese“ — diras profesoro Calmès — „bazante min sur la plej bona montrilo de la progresemo: sur la evoluo de la instruado.“

Hodiaŭ Albanio kalkulas 548 unuagradajn lernejojn, de kiuj 474 havas ankoraŭ nur unu solan klason, ĉar oni kreis ilin nur en tutlasta tempo; 28 lernejoj konsistas el po 5 klasoj. Entute

kaj Cannaregio (elp. kanareĝo); la aliaj nomiĝas:

Rio: kanaleto. Rioterra. Tiel nomiĝas la kanaloj plenigitaj.

Fondamenta: strato, kiu havas unuflanke domojn kaj aliflanke kanalon.

Piscina (elp. piŝina): larĝa strato antaŭita de akva vastaĵo.

Traghetto (elp. trageto): stacio de gondoloj, ankaŭ loko por transiri per gondolo la Grandan Kanalon.

(Laŭ baldaŭ aperonta „Gvidlibro tra Venezia“.)

Finnlanda Foiro.

La Finnlanda Foiro, kiu estis en 1920 internacia kaj en 1921 ekspozic nur produktajn enlandajn, nun daŭre havas internacian karakteron. La proksima foiro okazos en Helsinko (Helsingfors), de la 1. ĝis 6. julio 1923.

Interesuloj agos bone, se ili plej baldaŭ informos la direkcion pri sia partopreno, ĉar la luprezo por la stanoj plialtiĝas je 20% ĉiunokte. Per tiu rimedo la foira direkto volas kontraŭbatali la malbonan kutimon de multaj ekspozantoj, decidi pri sia partopreno nur en plej lasta horo. Tiu kutimo ofte malebligas al la direkto laŭplanan lokigon de la ekspozantoj kaj plue ebligas nur tre necertan ideon pri la grandeco kaj la graveco de la preparata foiro. Tiu lasta fakto nature multe influas precipe la foiran reklamon ĉe la aĉetantaro.

La foira direktoro, s-o Lauri Kuoppamäki, ĵus eldonis 32-paĝan bele ilustritan broŝuron pri la „ekonomiaj fortoj de Finnlando“. Ĝi enhavas multajn statistikojn pri la finna popolo, la agrikulturo, la lakta kaj ligna industrio, kaj valorajn informojn pri komercio, industrio kaj trafiko de tiu bela „lando de la mil lagoj“.

Tiu bone aranĝita kajero estas redaktita en Esperanto, por eviti multkoston eldonadon en multaj idiomoj. Ĝi estas sendata senpage al ĉiu intereso, kiu postulas ĝin de la foira sekretario, s-o Konrad Ojala, Messujen Toimisti, en Helsingfors.

(Laŭ agentejo „Esperanto-Press“ en „Neue Zürcher Zeitung“.)

Industrio kaj Komercio de Finnlando.

La historio de la industrio de Finnlando prezentas multe da intereso, kaj bone prilaborita statistiko ebligas en ciferoj sekvi ĝian evoluon. La tempo depost la jaro 1914 antaŭen faras tamen escepton, ĉar la ciferoj, kiujn donas la statistiko, estas iom erarigaj. La granda prezaltiĝo ekzemple malebligas precize taksii la realan pligrandiĝon de la produktado en diversaj industribranĉoj ktp., kaj krome la malnormaj cirkonstancoj, kiuj sekvis la malordon en komunikado kaŭzitan de la milito kaj la per tio interrompita importado de kruda materialo, same kiel interŝanĝo de varoj inter apartaj landoj kaŭzas tion, ke oni ne povas fari plene fidindajn konkludojn por la estonta evoluo. Post la granda paniko, kiu sekvis la militeksplosion, aperis en kelkaj industribranĉoj eksterordinara altkonjunkturo, dum aliaj branĉoj de la produktado pro la manko de krudmaterialo kaŭzita de la blokado estis pli aŭ malpli malvigilitaj. Post la paco denove sekvis tempo de lumaj perspektivoj por la estonto de niaj plej gravaj industribranĉoj, el kiuj precipe la ligno-kaj papperindustrio troviĝas en mezo de brila altkonjunkturo.

La industrio de la lando, precipe bazanta sur ĝiaj arbaroj kaj akvofortoj, fariĝis kun la tempo unuaklasa profesio, firme antaŭenirante per grandaj paŝoj kaj montrante la plej belajn foliojn en la ekonomia historio de la lando dum la lasta duonjarcento. Eĉ se la tero pro la kreskanta bezono de nutraĵoj:

duktoj estos grava naturriĉaĵo kaj la agrikulturo do havos grandan signifon por la industrio, oni tamen povas kompari, eĉ pliŝati la signifon de la industrio en la ekonomio de la lando kun la valoro de la terkulturo. La lando vere ne posedas multspecajn krudmaterialojn; kapitalo, necesa kaj grava kondiĉo por ĉiu grandindustrio, estas malgranda kaj la konsumo de la produktoj en propra lando limigata, sed la ekzistantaj naturrimoj, la arbaroj kaj la akvofaloj, kiuj ĝis nun estis nur malmulte uzataj, ebligas kaj pliligas ĉiam la evoluon de la industrio.

Nia plej grava industrianĉo estas lignorafinigo, ĉar ni ricevas por tiu sufiĉan krudmaterialon en propra lando. La produktoj de tiu industrio oni uzas nur malmulte en nia lando, sed ĉar ili estas grava eksportajo, kiuj enportas en la landon bezonatan kapitalon, la progreso de la lando do dependas de la evoluo de suprenomita industrio. Nij arbarriĉaĵoj kaj nia diversbranca ligno-industrio havas grandan signifon por la monda ekonomio kaj donas al ni tiurilate garantion de monopolistato, des pli certe, ĉar ĉi tiuj industrianĉoj nur malmulte dependas de la eksterlandaj krudmaterialoj. Ni devas nur prizorgi, ke ni mem kiel eble plej grandparte rafinigos niajn naturriĉaĵojn kaj tiamaniere antaŭenigos direkte al koncentriĝo kaj grandproduktado, rafinigo kaj ŝparemo kaj racia uzado de ekzistantaj fortofontoj.

El niaj t.n. naturaj industrioj la ligno-kaj papirindustrioj estas la plej gravaj. En la lastenomita industrio oni nuntempe pro la alte evoluinta tekniko rafinas eĉ la defalaĵojn en la seĝoj kaj el ambaŭ la valoro de la produktado restas en la lando. El aliaj pli malnovaj industrioj la metalindustrio nuntempe rimarkinde plivigliĝis, sed de ĝia produktvaloro oni devas forkalkuli la kostojn de la importata krudmaterialo. Ankoraŭ citinda estas la teksindustrio kun sia granda produktvaloro, kiu tamen ne kontentigas la bezonon, kaj fine la nutraj-kaj guaĵindustrioj, en kiuj oni ankaŭ ĉefe uzas importitan krudmaterialon, sed kies produktoj, dank' al certa importprotektio, tamen povis konkuri kun eksterlandaj produktaĵoj. Rilata al la kapitaliĝo, la lando havis malfavoran situacion. Sed deĉi kiam la industriaĵojn ĉiam pli ofte alprenis formon de akciaj societoj, kiam la privata bankfunkcio evoluigis kaj multfrankiĝis kaj la fondborso interesiĝis pri la industrivaloro, oni tamen en ĉiam kreskanta grado povis kontentigi la kapitalbezonojn de la grandindustrio. La eblecoj en ĉi tiu rilato kreskas proporcie al la evoluo de la bankfunkcio en sana direkto kaj sammezure kiel la kreskanta emisio en plej bona senco de la vorto povas esti gvidata al ĝustaj vojoj, diskontante nek frue nek tro vaste la venotajn gajneblecojn.

Samtempe kun kreskanta labordivido kaj evoluinta specialigo, kune kun pliligitaj kaj plibonigitaj komunikiloj sekvas pli granda varintersanĝo enlanda kaj kun eksterlando. La kreskanta vartrafiko sur ŝtatejoj kaj aliaj transportinstancoj de la lando atestas en certa grado, ke la enlanda komerco multe pliligiĝis sed la statistiko donas nekontraŭdireblajn pruvojn, ke la por la landa ekonomio tiom gravaj komercinterrilatoj kun eksterlando ankaŭ evoluigis rilate al vasto, intenso kaj gravo. La evidente ĉiam plivigliĝanta industria agado de la lando kun sia ĉiam kreskanta bezono de krudmaterialo kaj aliaj necesajoj, same kiel la samtempe kreskanta bonstato kaj multe pliligitaj vivpostuloj ĉe la loĝantaro rilata al la nutraĵoj, guaĵoj, vestaĵoj kaj aliaj varoj kaŭzis dum jaroj ĉiam kreskantan kaj ĉiam pli multflankan importon de diversaj produktoj el eksterlando. Tiu ĉi pliligitaj importoj ne estis tamen ebla sen pliligitaj eksportoj de enlandaj produktoj, kiun — kun helpo de plibonigitaj kaj plimultigitaj komunikiloj — pli kaj pli grandaj partoj de la lando ricevis eblecon subteni. Laŭ la statistiko la valoro de la importaĵoj estas pli granda ol tiu de la eksportaĵoj, kvankam la diferenco ne estas tiel granda, kiel la ciferoj montras, ĉar la en statistiko nevideblaj transport- kaj aliaj enspezoj forigas siaparte tiun ĉi diferencon. Oni konsideris ĉi tiun kreskantan pliligon de importoj suspekta kaj danĝera. Ĉar la importoj ĉiutage rimarkeble superis la eksportojn, oni antaŭ la milito ĉiam ĉe la diskutoj pri la ekonomiaj cirkonstancoj de la lando parolis pri la „malfavora“ komercbilanco. La ĉiam vigan, kun sukceso kaj bona rezultato faritan agadon en ĉiuj perlaborbranĉoj de la lando kaj t.n. malprofito en la komercbilanco ne montras malpligon de la havo, sed senĉese kreskantan

(Daŭrigo de la artikolo pri Albanio sur la 1-a paĝo.)
linioj kun longeco de 460 km.; ili kostus proksimume 140 milionojn da orfrankoj. Sed li akcentas, ke pli urĝa estas la konstruo de industriaj fervojoj por la transportado de mineraloj, je kiuj Albanio estas tre riĉa.

Produktado.

La ekonomia vivo dependas de la agrikultura produktado. Nuntempe tiu produktado estas nsufiĉa kaj Albanio estas devigata importi nutraĵojn, kiujn ĝi povus rikolti sur propra tero.

Oni povas diri, ke nur 1/6 de la agrikulturebla tero estas nun prilaborita. La metodoj ne estas tre modernaj, kaj la sudo de la lando estas pli progresinta. Tamen, ankaŭ tie oni ne konas la valoron de natura kaj artefarita (kemia) sterkaĵo.

En la montaro la popolo dediĉas sin al la bredado. Plej ofte oni trovas kaprojn kaj ŝafojn, sed ne pro la viando, la felo aŭ la lano, sed pro la lakto, el kiu la kamparano preparas bonegan fromaĝon. Ankaŭ ĉi-tie la metodoj estas tre antikvaj: mankas higiena zorgado.

Fruktoj. Ligno.

Pro la riĉeco de la lando je fruktarboj, la frukta kulturado povus esti tre grava por la eksporto, sed bedaŭre Albanio ne disponas pri speciale instruitaj arbokulturistoj.

Same estas pri la arbaroj, kiuj estas en tre sovaĝa stato. Oni taksas, ke en la ŝtata arbaro estas pli ol 5 000 000 m³ da ligno.

Rimarkinde estas, ke la registaro jam enkondukis diversajn modernajn procedojn, laŭ kiuj oni nun komencas eksploati la lignan riĉecon de la lando.

Agrikulturo.

Agrikultura lernejo kun modelobieno malfermiĝis en septembro 1921 kaj havis, post unu jaro, jam 40 lernantojn; ĝi konsistas el 3 sinsekvaj klasoj. Ankaŭ „eksperimenta kampo“ estas nun instalita por la studentoj.

Por propagandi la uzadon de modernaj laboriloj, la registaro kreis specialan vendejon en Valona kaj senpage disdonas semajojn al la kamparanoj por akceli la kulturgon de novaj regionoj. Sed la plej efika rimedo, kiu multe antaŭenpuŝas la agrikulturon, estas la kontraŭbatalo de la periodaj subakviĝoj de vastaj regionoj kaj la elpumpado de la marĉaj distriktoj. La sektigo de tiuj landpecoj kaj la reguligo de la akvo-kuroj estas plej necese. Laŭ profesoro Calmès tio bezonus proksimume 50 milionojn da frankoj, sed Albanio havigus al si 1732 km² da nova kaj fruktema tero. Taksante al 80 000.— da frankoj 1 km², la regiono nun okupata de marĉoj reprezentos valoron de 138 milionoj! Eksterlandaj kapitalistoj povus tre bone aranĝi sin kun la registaro, kiu donus al ili eksploatado dum certa tempo la teron de ili sekigitan.

Industria vivo.

Industrio laŭ modernaj ideoj ne ekzistas en Albanio.

Tamen estas vaporaĵ muelejoj en kelkaj urboj. Sed ilia produktado ne respondas al la bezonoj de la lando. Tial Albanio devas importi, en 1921, farunon por pli ol unu miliono da frankoj.

Ankaŭ la oliv-olea industrio ne estas tre disvolvita, laborante laŭ malnovaj metodoj. Sole en Valona oni havas hidraulikajn premilojn. Tiu industrio estas tre pligrandigebla kaj oni povus aldoni al ĝi ankaŭ la fabrikadon

produktan agadon, kiu pro la manko de ŝparkapitalo en propra lando postulas el eksterlando prunteprenitan kapitalon. Ĉar oni tamen uzis ĝin ĝis nun ĉefe por produktemaj celoj, ili ĝis plue nur utilis al la lando.

La statistiko de la lastaj jaroj montras la grandan efikon de la milito kaj ĝiaj konsekvencoj kaj ke multaj eksterordinaraj faktoroj, nekompereblaj kun la antaŭmilita tempo, influis al la komercpolitika kaj ekonomia situacio de la lando. Pli preciza kontrolado de la ciferoj montras unue, ke la valorpliiĝo ne dependas de la ekvivalenta kvantopliiĝo sed estas kaŭzita de la militaj importmalfacilaĵoj kaj malnormalaj ŝan-

de saĝo. Hodiaŭ Albanio devas eksporti sian olivan oleon al Italio, kie oni rafinas ĝin.

En la provinco de Argyrokastron oni havas tre bone funditan fromaĝan industrian, kiu eksportis, en 1921, por Fr. 179 000.— da fromaĝo al Grekio. La cigaredaj fabrikoj ĝis nun laboras sole por la enlanda merkato.

La tekstila branĉo ne estas tre grava, sed la tanado povus tenti kapitalistojn, ĉar la bestbredado estas tre evoluebla; la antikvaj metodoj nun uzataj nature devus cedi al modernaj procedoj.

Resume, tre grandajn ŝancojn havas la industrioj cereala, frukta, oliva, tabaka, fela, ligna, lana, lina kaj lakta. Plej grava inter ĉiuj ŝajnas la ligna (seĝoj, celulozo), kies plej granda aĉetejo estas la najbara Italio.

Grandan eksterlandan kapitalon bezonas ankaŭ la mineralaj industrioj, kiuj tute ne estas evoluitaj en Albanio, kvankam tiu lando estas vere riĉa je diversaj mineraloj. Jam nun eksterlandanoj okupiĝas pri la eksploatado de petrolaj kaj karbaj minejoj.

cigareda papero „ 324 699 '
sapo „ 323 949
alumetoj „ 86 363

Tuj oni konstatas, ke tre multaj el tiuj importitaj aŭ re-importitaj artikloj povus tre bone esti fabrikataj aŭ prilaborataj en Albanio mem.

El la listo de eksportitaj varoj dum 1921 ni eliras tiujn ciferojn:

Eksporto 1921.

Ollivoj	Fr. 352 484
oliva oleo	„ 354 557
citronoj	„ 27 586
lakto	„ 11 258
fromaĝo	„ 178 721
butero	„ 83 344
ovoj	„ 286 494
tabako	„ 27 017
ĉevaloj	„ 30 977
azenoj	„ 78 279
porkoj	„ 17 847
fiŝoj	„ 84 351
haŭtoj	„ 247 369
ligno	„ 28 785
karbo	„ 35 660
bitumo	„ 67 987

La komerca bilanco de Albanio do suferas.

Por malgrandigi la importon estas necese, pli grandigi la produktadon de artikloj, kiujn Albanio jam liveras, sed en nesufiĉa kvanto. Estas la agrikultura produktaĵoj.

Por pligrandigi la eksportojn, necesas ankaŭ pligrandigi la produktadon.

Dum 1922 jam bona progreso estas konstatabla en tiu rilato.

Publikaj financoj.

Antaŭ ĉiuj ŝtatoj, Albanio havas la grandan avantaĝon, ke ĝi ne havas ŝuldojn en eksterlando. Preskaŭ oni povus diri, ke ankaŭ enlanda ŝuldo ne ekzistas.

La ŝtata budĝeto de 1922 antaŭvidas deficiton de Fr. 2 448 342.—. El la ŝtataj elspezoj (laŭ la budĝeto de 1922: Fr. 22 195 552.—) la Milita Ministerio postulas la ĉefan sumon, preskaŭ la trionon (Fr. 7 310 632.—). La deficiton estos do evitebla, post kiam la landlimoj ne plu bezonas grandan soldatan protektadon kaj post kiam reformo de la armeo estos decidita.

Konkludo.

Konkludon ni mem ne volas fari. La raporto de s-o Calmès estas tiel klara kaj akurata, ke ĝi ne bezonas kompletigon. Tamen ni ne povas fini nian artikolon, ne citante la gravan libron pri Albanio, kiun skribis nia amiko s-o Justin Godart, franca deputito. Nia legantaro plezure aŭdos, ke s-o Justin Godart ne nur estas varma defendanto de Esperanto, sed ankaŭ pioniro de tiu malgranda lando, pri kiu ni hodiaŭ parolas.

El lia libro „L'Albanie en 1921“ ni tradukas la sekvantajn konsiderojn:

„Pri la estonto de Albanio ni plene konfidis. Kiam tiu lando iam povos, sub la garantio de la Justo, uzi ĉiujn siajn fortojn en laborado, tiam ĝi rapide atingos prosperacon.“

Ĝi komencas sian politikan kaj ekonomian vivon, kiam la aliaj nacioj pene palpadas por modernigi. Ĝi povas do, jam de la komenco, profiti de ĉiuj observoj kaj spertoj, kiuj kostis al la aliaj tiom da tempo kaj mono.

Albanio devos fariĝi, pro sia natura beleco kaj sia originala ĉarmo, ankaŭ multe ŝatata lando por la turismo...“

„Justin Godart: L'Albanie en 1921. Préface de M. D'Estournelles de Constant, sénateur. Illustrations et Cartes. Paris 1922, Les Presses Universitaires de France, Bd. St. Michel 49. Prezo: Fr fr. 15.—.“



Akcepto de s-o Justin Godart (X), franca deputito kaj fervora amiko de Esperanto, en Koritza (aprilo 1921).

Komerco.

Pri la ekstera komerco de Albanio ni publikigas la sekvantan tabelon, kiu havas kiel bazon la oran frankon:

Lando	Importo (en mil frankoj)	Eksporto (en mil frankoj)
Italio	12 731	1 614
Grekio	2 124	488
Turkio	665	—
Britio	1 135	—
Aŭstrio	669	—
Jugosl.	335	88
Entute:	17 659	2 190

Jen la statistiko pri la ĉefaj artikloj, importitaj en 1921 (en oraj frankoj):

Importo 1921.

Maizo	Fr. 290 424
rizo	„ 858 767
faruno	„ 1 157 416
kafo	„ 813 335
sukero,	„ 2 900 506
sukeraĵoj	„
alkoholo, vino,	„ 165 002
biero, likvoroj	„ 273 170
vestaĵoj	„ 2 042 069
artikloj en kotono	„ 431 040
„ „ lino	„ 104 136
„ „ lano	„ 46 043
„ „ silko	„ 1 447 242
feraĵoj	„ 77 604
najloj	„ 61 900
cemento	„ 42 784
porcelano	„ 95 856
ledo	„ 91 996
ŝuoj	„
aŭtomobiloj	„ 355 688
bicikloj	„ 1 047 118
petrolo	„

ĉi en prezo kaj valutocirkonstancoj. Oni tamen havas nenian kaŭzon por maltrankviliĝo kaj oni povas plene fidi al la estonteco. La nuntempa malalta kurzo de nia valuto ne havas motivojn, se oni atentis al la politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj, multaj naturriĉaĵoj kaj estontaj eblecoj de la lando, kiuj kontraŭe devus elvoki ĉe la eksterlandaj financ- kaj komercrondoj plenan fidon al la estonta ekonomio de la lando.

Pli ne vidas el la statistiko, ke oni antaŭe ĉefe importis nutraĵojn, pretajn fabrikaĵojn ktp. kaj nur malmulte da krudmaterialo, duonfabrikaĵoj, maŝinoj ktp. En ĉi tiu rilato oni tamen lastatempe rimarkis plibonigon tiurilate, ke

interrilatoj de la lando estis antaŭ la milito plej viglaj kun Rusio, al kio helpis proksima najbareco, ĝia politika dependeco de Rusio kaj kelkaj reciproke konsentitaj impostfaciligoj ktp. El tiu lando oni ĉefe importis nutraĵojn kaj kelkajn krudmaterialojn, dum oni eksportis tien plejparte paperfabrikaĵojn kaj iom da maŝinoj kaj teksaĵoj. Ĉar Rusio havas multajn, tre diversspecajn naturriĉaĵojn, kiuj povas fariĝi tre utilaj por ni, kaj ĉar ĝi siaparte havas multajn bezonojn, kiujn ni plej bone povos kontentigi, oni povas kun certeco supozi, ke deĉi ordiĝo de la cirkonstancoj en Rusio inter la landoj komencos malgraŭ disiĝo bonrilata, daŭra kaj disvolviga najbareco kun vigla komercintersanĝo.

Post tio sekvas rilato al la vicleco de komercaj interrilitoj Germanio, kiu ne estas granda konsumanto de niaj produktoj sed tamen sukcesis akiri en Finnlando bonan merkaton de multaj tre diversaj aĵoj, el kiuj plejparte tamen venis el Germanio nur transite, de kies havenoj ili estas pluensendataj al Finnlando.

Kontraŭe kun Anglio la varintersanĝo ĝis plue en ĉiuj rilatoj ne fariĝis tia, kia ni ĝin povus supozi kaj esperi. Kiel granda konsumanto de niaj plej gravaj eksportaĵoj, ĝia eksporto al ni estis malgranda.

Ankoraŭ nia lando havis komercajn interrilitojn kun Nederlando, Belgio, Francio kaj Hispanio, al kiuj landoj ĝiaj eksportaĵoj kun sukceso kaj en granda kvanto estas venditaj. Kun Skandinavio kompare al la tri unue nomitaj landoj, la intersanĝo estis malpli vigla, dependante de tio, ke la lando plejparte ricevas samajn produktojn kiel la skandinavaj landoj kaj sekve do pli vigla komercintersanĝo ne estis ebla.

Kia fariĝas la estonteco en ĉi tiu rilato, kiam ĝis plue nur du komercaj traktatoj ekzistas, estas malfacile diri. Tamen oni kun kontento rimarkas kreskantan intereson por klopodoj en pli granda grado ol antaŭe senpere interrilitoj kun transoceanaj landoj, kie niaj necesajoj estas produktataj kaj kien niaj eksportaĵoj komence estas vendebaj. Ĉi tiuj sanĝojn en komercaj rilatoj kaŭzas la milito. Ĉi tiuj jam naskiĝintaj rilatoj estas fortigitaj kaj disvolvigitaj de enlandaj firmoj, kiuj havas filiojn sur transmaraj lokoj, kaj kiuj per helpo de rektaj kaj propraj ŝipoj, ekkomencis rektan kaj regulan oceontrafikon.

(El la broŝuro „La ekonomiaj fortoj de Finnlando“)

III-a Poznań'a Foiro.

Printempon, de 29. aprilo ĝis 5. majo okazos en pola urbo Poznań la III-a Poznań'a Foiro.

La sukceso de la du antaŭaj foiroj en la jaroj 1921 kaj 1922 kaj la nunaj preparaj laboroj: mildekoj da ĉiutage elsendataj invitoj, informiloj, reklamiloj, afiŝoj ktp. rajtigas nin esperi, ke la sukceso de la foiro estos grandega, ke ĝia celo estos tute atingata.

Kaj ĝia celo estas konata.

Kunigante dum unu semajno la tutan polan industrion kaj komeron, el kiu i. a. la ter-kaj teksaĵindustrioj estas fame konataj, ĝi celas ĉefe konigi la polan industrion kun la eksterlando kaj helpi al la komenco de novaj komercaj interrilitoj.

La grandan ekinteresiĝon de la eksterlando pri la Poznań'aj Foiroj pruvis la du antaŭaj foiroj dum kiuj okazis multaj interligoj de daŭraj komercaj interrilitoj de polaj komercistoj kaj industristoj kun firmoj eksterlandaj, precipe el balkanaj ŝtatoj, Rusujo, Turkujo, Ameriko k. a.

La urbo Poznań (kun ĉirkaŭ 200 000 enloĝantoj) kuŝanta en Okcidenta Polujo, havas speciale bonan geografian situacion, komfortan fervojan komunikadon kaj en multaj rilatoj estas urbo interesa kaj vidinda.

La foiraj teritorioj, kuŝantaj proksime de la ĉefstacidomo kaj de urba centro, ampleksas ĉirkaŭ 250 000 m², la haloj, el kiuj la granda, bele konstruita „Turo Supersilezia“ estas konata, pli ol 30 000 m².

Dank' al klopodoj de la loka Esperanto-grupo la estraro de la foiro ekinteresiĝis pri Esperanto kaj disponigis al ĝi senpage ejon por ekspozicio kaj informejo.

Per faktoj ni devas montri al la estraro la taŭgecon kaj utilecon de Esperanto.

Komercistoj ĉiulanda, venontaj Poznań, uzu bonvole niajn servojn, skribu Esperante al la foiroficejo, postulu informojn en Esperanto! (Adreso: Targi Poznański, Poznań, Plac Sapieżyński, Polujo.)

Internacia Specimena Foiro de Praha

de la 11.-18. marto 1923.

Nova centra merkato de Mezeŭropo. Krudmaterialoj. Terkulturajoj. Duon- kaj plenfabrikaĵoj. Balkana debita trafiko.

Partoprenita de unuarangaj mondfirmoj el ĉiu propukta branĉo. La produktado de la nuntempa Ĉeĥoslovakio ampleksas 80% el la tuta ekonomio de la Iama Aŭstrio-Hungario. Per sia monkurzo Ĉeĥoslovakio estas la plej riĉa fonto por akcetitaj el la tuta mondo, kiuj ne preterlasas la viziton de la Specimena Foiro de Praha. 3000 ekspoziciantoj kaj negoca rezultato de 1 miliardo da Ĉeĥoslovakaj kronoj. Plej severega koncentro de en- kaj eksterlandaj ofertantoj. Plej malkara kaj plej bona pogranda akcio. Foiro borsita.

FOIRAJ AVANTAĜOJ:

55 1/2% a biletrabato en Ĉeĥoslovakio. Pasport-rabato. Specialaj vagonaroj. Speciala loĝeja fakoj. Interpretiloj. Speciala Foiro Esperanto-Servo. Renkontejoj por fremdnacianoj. Fakaj kongresoj Vizitoj de vidindaĵoj de Praha. Ĉiuj avantaĝoj de la ceteraj foiroj.

Foiroj, firmoj, uzantaj Esperanton, sendu al ni viajn prospektojn, katalogojn, reklamilojn ktp. por nia ekspozicio. Gesamideanoj, ĉiuj helpu nin laŭpove por la bono de nia komuna afero.

Por la Foiro Komitato de Pola Esperanto Societo Poznan: **Tadeusz Kapela**, Poznan, ul. Zorawia 19, Polujo.

Rimarko. Ĉiuj gazetoj estas petataj represi tiun artikolon kaj sendi ekzempleron kun la artikolo al la supre citita adreso.

Tra la Mondo.

Albano.

La albana registraro traktas kun amerikanoj kaj anguloj pri ekspluatado de petrolaj minejoj en Albanio.

Ameriko.

Oni skribas al „*Esperanto-Press*“ el Egipto, ke oni tie atendas komercan misionon el Ameriko, kiu konsistus el pli ol cent partoprenantoj. Tiu misiono intencas studi la ekonomian situacion en Oriento kaj iri ankaŭ al Roma, okaze de la Konferenco de la Internacia Komercia Ĉambro.

Japanio.

En japana lingvo mi ricevis 48-paĝan multe ilustritan presaron kun subtitolo en Esperanto „*La Monopol-Informado*“, sed sen aliaj klarigoj en lingvo komprenebla de Eŭropanoj. Ĉu estas gazeto, ĉu broŝuro? Ni scias nur tion, ke la eldonanto estas: *Tobacco & Cigarette Department Monopoly Bureau* en Taipeh (Formosa, Japanio). — Pliajn informojn ni danke akceptos!

Svislando.

Ĉekkontoj ĉe la poŝto: — En fino de decembro 1922, la nombro de personoj aŭ firmoj, kiuj havas ĉekan konton ĉe la poŝto, estis 46184, kontraŭ 42740 en la fino de 1921. La entuta mona movado dum la sola monato decembro 1922 atingis sumon de Fr. 1514354311.— Ĉe la fino de la jaro troviĝis sur la kontoj la sumo de Fr. 149007637.—

Konsiderante, ke en poŝto oficejo de 10 svisaj urboj funkcias poŝtĉeka servo, oni povas diri, ke svisaj komercistoj — kaj ankaŭ privatuloj — multe favoras tiun tre praktikaŭ instalaĵon. La tarifoj por ĝirado de unu konto al alia estas tre malaltaj; la tarifoj por pago sur poŝtĉekan konton, pagata de la kontohavanto, estas ankaŭ tre modesta kaj malpli alta ol por poŝtmandatoj. Por deponita mono, la poŝto pagas interezon de 2%.

Venezuelo.

Oni skribas al „*Internacia Komercio*“, ke eksportistoj de Venezuelo esperas baldaŭ revigligon de la aferoj. La „*Agencia Pumar*“ publikigas statistikon pri la importo kaj eksporto de Venezuelo en la jaroj 1916/21 laŭ kvanto kaj valoro:

Importo:

1916	K 115 242 451	B 106 914 089
1917	K 91 961 177	B 114 964 886
1918	K 44 780 957	B 77 244 950
1919	K 72 894 042	B 177 245 765
1920	K 128 825 590	B 502 229 895
1921	K 72 784 895	B 92 455 819

Eksporto:

1916	K 189 875 108	B 117 652 854
1917	K 245 544 952	B 120 024 560
1918	K 218 410 618	B 102 659 155
1919	K 254 585 157	B 258 668 750
1920	K 212 315 057	B 170 744 156
1921	K 381 455 382	B 135 359 884

Tio montras, ke la komerca bilanco de Venezuelo estis ĉiam aktiva, escepte en 1920

Esperanta Kroniko.

Svislando.

La „*Svisa Asocio por Komuna Komercia Lingvo*“ perdis, en la fino de la pasinta jaro, sian honoran prezidanton, s-on **Robert Comtesse**, federacia eks-konsilanto, eksdirektoro de la Internacia Oficejo por Protektado de la Spirita Propraĵo, ktp. La gazetaro de la tuta lando parolis pri la morto de tiu eminentulo, kaj kelkfoje ni legis eĉ aludon al Esperanto.

Nove eniris en la estraron s-o **Edm. Privat**, Genève.

La sekretariejo troviĝas nun ĉe s-o **Hj. Unger**, en Lausanne, „*St. Luce*“, Petit Chêne. — Oficiala organo estas *IK*.

Oni skribas...

Komercaj Delegitoj.

O. P. La komerca konferenco en Venezia certe kolektos tre valoran statistikan materialon koncerne la disvastiĝon de Esperanto inter komercistaro. Tamen la ĉefa tasko de la konferenco estos, trovi taŭgajn rimedojn por antaŭenpuŝi la praktikan uzadon de nia lingvo en komercaj rondoj. Estas do rekomendinde, ke la Esperantistoj, kaj speciale la komercistoj, jam nun faru tiurilatajn proponojn, kiuj povas esti diskutataj en „*Internacia Komercio*“ antaŭ la konferenco. Ju pli frue la diversaj deziroj kaj proponoj de la komercistoj estas konataj kaj preparolotaj, des pli rapide progresos la laboroj en Venezia.

La komercistoj bezonas grandan tutmondan organizaĵon por siaj celoj kaj bezonoj. Sed ne estas necese fondi novan internacian Komercistan Unuiĝon, ĉar la Universala Esperanto-Asocio (UEA) jam ludas similan rolon. Ĝi estas modele organizita kaj havas delegitojn en ĉiuj landoj, kiuj jam nun donas ankaŭ komercajn informojn. Tamen kelkaj plibonigoj de la delegita sistemo estas necesaj. La delegitoj kaj vicdelegitoj de UEA havas ĉiuspecajn profesiojn kaj ofte ne scias multe pri komercaj aferoj. Ili ofte ja uzas la helpon de aliaj kompetentaj Esperantistoj por plenumi la servojn postulitajn de komercistoj, sed ĝenerale estus nepre dezirinde, ke komercistoj povu sin adresi senpere al samprofesianoj.

Pro tio mi proponas, ke UEA elektu krom siaj ĝisnunaj delegitoj en ĉiu urbo specialan „*Komercan Delegiton*“ (K. D.), al kiu ĉiuj demandoj kaj petoj pri komercaj aferoj estu sendataj. En urboj, kie ekzistas Esperantistaj Komerciaj Grupoj, tiuj organiz-

ajoj kiuj aliĝu en sia popra intereso al UEA, eble povus ludi la rolon de K. D. Se tiu propono esence estos akceptita pluaj detaloj estas preparolotaj.

Alia afero facile povus esti kunigita kun la K. D.-a sistemo. La komercisto havas la plej grandan intereson, havigi al si findindajn informojn pri firmoj en eksterlando. Oni rajtigu la Komercan Delegiton ankaŭ plenumi tiajn servojn sen respondeco de UEA. La K. D. ja povus uzi por tiu celo la helpon de profesiaj informejoj. Detaloj pri la tarifoj kaj la maniero de la rekompenco estas poste preparolotaj. Eble UEA povus vendi kuponojn, kontraŭ kiuj la firmoj ricevos de la K. D. la deziratan informon.

Por centrigo de ĉiuspecaj komercaj informoj la Centra Oficejo eble povus starigi specialan komercan fakon, kiu estu en ĉiamaj interrilatoj kun „*Internacia Komercio*“.

Ju pli multe da avantaĝoj ni povas prezenti kaj garanti al la komercistoj, des pli volonte ili aliĝos al nia movado. Ili uzos Esperanton en ĉiam kreskanta mezuro kaj rigardos ĝin serioza helilo en komercaj aferoj.

Pri tiu ideo de ŝatata Nürnberg'a kunlaboranto ni devas diri, ke ĝi estis private diskutita jam en Praha; la redaktisto de ĉiama *IKR* kelkfoje kaj detale priparolis la planon kun s-o **Stettler**, prez. de UEA.

La tiama interŝanĝo de opinioj efektive montris la necesecon, elektit K. D. en ĉiu pli grava komerca urbo de la mondo. Ni esperas, ke la Venezia Konferenco realigos tiun ideon.

Alia afero estas tiu pri „*informoj*“ koncerne firmojn (kreditindeco ktp.), ĉar internacia „*tarifo*“ estas tre malfacile farebla hodiaŭ, pro la monkurzoj. Demando ankaŭ estas: ĉu ni organizu konkurencon kontraŭ la profesiaj informejoj? Jen tre delikata afero. Cetere, UEA ne malpermesas al siaj delegitoj, doni tiajn informojn (sub privata respondeco), sed ni kredas, ke la kosto, precipe por malbonvalutaj landoj, estas tro alta.

Pri la „*Komercistaj Grupoj*“: ni ne ŝatus vidi tutan grupon kiel „*delegiton*“, sed ni forte subtenas la ideon, ke UEA laboru en plena harmonio kun tiuj grupoj kaj precipe kun la „*Internacia Federacio por Komuna Komercia Lingvo*“, elektante K. D. aŭ organizante komercan servon.

(Red.)

Fama svisa ĉokolado

TOBLER

konata tra la tuta mondo.

Internacia Finnlanda Foiro Helsingfors

Ĉiujare 1.-6. julio.

Internacia Adresaro.

Komerco. Industrio. Turismo.

En nia Internacia Adresaro ni publikigas informojn pri ĉiu entrepreno komerca, industria kaj turisma. La enpresoj estas senpaga.

Ni petas, ke oni sendu al ni akurateajn adresojn kun detaloj de ĝenerala aŭ speciala intereso. De katalogoj, prospektoj aŭ reklamo-folietoj kun Esperanta teksto oni sendu al ni po 3 ekzempleroj.

(Klarigo: *k* = korespondas en Esperanto; *r* = reklamo en Esperanta gazeto; *p* = prospekto, presajo en Esperanto, aŭ kun Esperanta teksto.)

Firma registro.

Armstrongs' Ltd., Burnley (Brit.). Stand Street 31.

Negociistoj, importistoj. Vitraj, porcelanaj, bijuterio, ludiloj, artikoloj por fumantoj ktp.

Aarnio & Lehtinen S. A., Helsinki (Finnl.), Mikonkatu 23.

Importo, eksporto, komiso. Akcia kapitalo: Fmk. 1 000 000.—.

Banque Agricole Coopérative (Centre des Syndicats), Sofia (Bulgario), strato Vrabtcha 2.

Koopera banko agrikultura; centro de la sindikatoj. Eksporto de agrikulturaj produktaĵoj; importo de maŝinoj. Kapitalo: 4000000. Levolo: k.

Thos. Cooks & Son, London E. C. 4 (Britio), Ludgate Circus.

Vojaĝa oficejo. Kontoroj tra la tuta mondo. k. r. p.

Ekstera Komercio de Francio.

La franca dogana administracio publikigis la statistikon pri la ekstera komercio de Francio por 1922. La sekvanta tabelo montras la valoron de la varoj importitaj kaj eksportitaj, kompare al 1921, en francaj frankoj:

Importo:	Jaro 1922	Jaro 1921	Diferenco por 1922
Nutraĵoj	5 800 002 000	5 784 316 000	+ 51 686 000
Materialoj por la industrio	14 048 140 000	11 408 956 000	+ 2 639 184 000
Fabrikaĵoj	4 052 469 000	4 910 636 000	- 858 177 000
	23 900 601 000	22 067 908 000	+ 1 832 693 000
Eksporto:			
Nutraĵoj	1 920 799 000	2 070 850 000	- 150 051 000
Materialoj por la industrio	5 445 877 000	4 091 598 000	+ 1 352 279 000
Fabrikaĵoj	11 860 191 000	12 356 415 000	- 496 224 000
Poŝtpakaĵoj	1 417 124 000	1 253 649 000	+ 163 475 000
	20 641 991 000	19 772 512 000	+ 869 479 000

En 1922 la importo do estas pli alta ol la eksporto je Fr. 3 258 610 000; la komerca bilanco estas do pasiva.

La valuta mizero en Germanio.

Sub kiaj malfacilegaj valutaĵ cirkonstancoj lastatempe devas labori la germana industrio, tion — pli evidente ol longa artikolo — montras statistiko pri la ŝanceliĝado de la germana valuto dum la pasintaj monatoj. En Berlino estis notitaj:

Dato	Dolaro	Sterl. Pundo	Holanda Guldono	Svisa Franko	Franca Franko	Sveda Krono
14. okt. 1922	2 885	12 791	1 121	532	218	770
21. okt. "	4 438	19 451	1 740	814	331	1 172
23. okt. "	4 110	18 204	1 604	746	296	1 102
2. nov. "	4 949	22 055	1 934	907	345	1 328
8. nov. "	9 172	40 601	3 568	1 684	556	2 451
21. nov. "	6 190	27 669	2 431	1 157	463	1 624
28. nov. "	8 796	39 598	3 458	1 649	606	2 340
1. dec. "	7 669	33 583	2 942	1 458	528	2 025
6. dec. "	8 433	38 345	3 358	1 578	583	2 275
18. dec. "	6 115	28 571	2 461	1 162	468	1 644
19. dec. "	7 330	34 085	2 937	1 401	541	1 964
20. dec. "	6 704	30 576	2 661	1 275	501	1 179
28. dec. "	7 588	36 340	3 007	1 438	546	2 040
2. jan. 1923	7 278	33 583	2 869	1 378	536	1 949
15. jan. "	11 904	55 338	4 685	2 235	820	3 177
18. jan. "	23 082	107 267	9 122	4 320	1 533	6 205
20. jan. "	18 796	86 215	7 343	3 583	1 238	4 862
31. jan. "	49 122	228 068	19 373	9 152	2 892	13 132
3. febr. "	37 343	173 432	14 636	7 017	2 335	7 017
5. febr. "	42 355	198 996	16 842	7 979	2 616	11 278
16. febr. "	18 947	88 320	7 468	3 619	1 152	4 912
20. febr. "	23 308	108 520	9 147	4 365	1 413	6 215
26. febr. "	22 806	107 016	9 022	4 280	1 390	6 065

Oni postulu la „Victoria“-Ekspost-prezistion

en germana-hispana au germana-angla lingvoj.

Gebr. Schmid, Augsburg (Germ.) str. F. 199.

Importo, eksparto, komizio. k.
M. U. Schoop, Zürich 5 (Svislando), Hardturmstr. 78.

Laboroj por metalizado; vendejo de la Schoop'aj patentoj pri la metaliza pistolo. k. r. p.

S. A. des Chocolats Suchard, Serrières (Svislando).

Cokolada fabriko. r.
S. A. des Chocolats Tobler, Bern (Svislando).

Cokolada fabriko; specialej markoj „Amanda“, „Nimrod“, „Berna“, „Mokka“, „Toblerido“, „Espero“.

Unger & Hoffman, Dresden A 16, (Germanio).

Fabriko de fotografaj aparatoj, platoj k.

Dr. A. Wander S. A., Bern (Svisl.).

Fabriko de fortiga nutraĵo „Ovomaltine“, de fluida kaj seka malkonstraktoj, de „Maltosano“, „Nutromalto“ ktp. Filioj tra la tuta mondo. Esperanta broŝuro pri „Ovomaltine“ senpage sendata al postulantoj. k. r. p.

S. Webster Ltd., London E. C. 2, (Britio), Moorgate Station Chambers.

Fabriko de karbopapero kaj rubandoj por skribmaŝinoj, marko „Centaur“.

Knut A. K. Wennerström S. A., Stockholm (Svedlando), Drottninggatan 45.

Podetala kaj pogranda vendejo de ŝtofoj por virinaj vestaĵoj; importo de eksterlando. Akcia kapitalo: Sv. Kr. 1500000 k.

Komercaj Ĉambroj.

(Post la urbo sekvas la strato kaj la nacilingva titolo de la komerca ĉambro.)

Bath (Britio): „Chamber of Commerce“.

El rezolucio adoptita en 1918: „... kredas, ke Esperanto estu la lingvo la plej akceptebla en komerca intereso.“

Budapest (Hungario): „Komerca kaj Metia Ĉambro“.

El letero de la 19. aprilo 1921 (kontrola numero: 3497/1921): „... interesigas plej varme por ĉio, kio celas pliriĉigi nian ekonomian vivon, do ankaŭ por la disvastigo de la lingvo Esperanto...“

Burnley (Britio): „Chamber of Commerce“.

El rezolucio, adoptita en 1917: „... estas de tre granda valoro ke unu lingvo, Esperanto povus esti adoptata kiel la komerca lingvokaj instruata en ĉiuj lernejoj... Farante tiel, Esperanto formus la bazon por komerca komunikado tra la mondo.“

Genève (Svislando), 2 Place Bel-Air, „Camera di Commercio Italiana per la Svizzera“.

Nov. 1921, decido de la konsilantaro, esti favora al la disvastigo de Esperanto.

Lausanne (Svislando), Escalier des Grottes, „Chambre de Commerce Vaudoise“.

20. 11. 21, decido de la estraro, morale apogi la Esperantan movadon, kies disvastigon ĝi forte deziras.

Olomouc (Olmütz, Ĉeĥoslovakio): „Handels- und Gewerbekammer“.

El letero de la 2. aprilo 1921 (kontrola numero 4432): „... subtenas en la sfero de sia agado la instruadon de Esperanto...“

Paris (Franci.), Place de la Bourse 8, „Chambre de Commerce“.

Post raporto de studa komisiono, prezidita de s-o André Baudet je la 9. 2. 21., unuanima akcepto de rezolucio favora al Esperanto: decido, enkonduki laŭvolan instruadon de Esperanto en siajn komercajn lernejojn; deziresprimi, ke tiu instruado estu ĝeneraligata tra la tuta mondo kaj ke la Komercaj Ĉambroj ĉie favoru la propagadon de Esperanto.

Plymouth (Britio): „Chamber of Commerce“.

El rezolucio adoptita en 1918: „... Esperanto, kies uzado montras, ke ĝi estas rapide lernebla kaj kapabla por esprimi plei delikatajn nuancojn, devus esti adoptata kaj instruata en ... lernejoj.“

Reichenberg (Liberec, Ĉeĥoslovakio): „Handels- und Gewerbekammer“.

El letero de la 2. marto 1921 (oficiala kontrola numero: Zl. 4787): „... tute simpatias kun la Esperanto-movado kaj estas preta, akcepti korespondantojn en tiu-ĉi lingvo kaj laŭ deziro, ankaŭ respondi en ĝi.“

Foira Kalendaro

La kadro Fr. 10.— po foto 6 anoncoj: Fr. 50 — 12 anoncoj: Fr. 100.

Basel
Svisa Specimena Foiro
1923: 14—24 Aprilo
Postulu Esperantan Prospekton

Frankfurt a. M.
Internacia Specimena Foiro
Printempo 1923
Aŭtuno 1923

Leipzig
Internacia Specimena Foiro
Printempo 1923
Aŭtuno 1923

Praha
Internacia Specimena Foiro
Printempo 1923: 11.—18. 11.

Borso de IK.

La „Borso de IK“ estas senpage al la dispono de ĉiu leganto: fabrikisto, eksportisto, importisto, aĉetanto kaj agento.

Servantoj kaj ofertanto bonvolu detale skribi al ni sian dezirojn, kiujn ni senpage publikigas por diskonigo al la legantaro de IK tra la tuta mondo.

En nia unua numero ni bedaŭre ne ankoraŭ povas publikigi „demandojn“ kaj „ofertojn“. Sed ni esperas, ke nia legantaro multe uzos la servojn de tiu rubriko, kiun ni krei speciale por ili.

Plezure ni atendas la dezirojn de nia legantaro kaj ni ĝojos, se aferoj realiĝos „per IK“ kaj „per Esperanto“!

Bibliografio.

Komerca Korespondo. — Kunmetis J. Borel. Kajero 16 de la Esperanta Biblioteko Internacia, 2-a eldono, 1922. Esperanto-Eldonejo Ellersiek & Borel G. m. b. H., Berlino.

Ne estas necese, laŭdi tiun jam konatan libreton, ĉar la nomo de s-o Jean Borel sufiĉas kiel rekomendo. Tamen ni ne aprobas la vorton „ofri“, ĉar intertempe „oferti“ trovis tutmondan uzadon.

„Frajto“ estas neelmitinda sinonimo de „freto“; por „spekulacio“ ni jam ofte vidis pli praktikan „spekulo“. Ne oportuna ni trovas la uzadon de la iama „Esperantista Monunuo“ (Spesimilo, e'pensita de s-o René de Saussure), ĉar ĝi ne estas konata al novaj Esperantistoj.

Mallonge...

... La firmo Dr. A. Wander S. A. en Bern (Svislando) eldonis belan Esperantan broŝuron pri „Ovomaltine“ (fortiga nutraĵo), kiu estas senpage havebla.

... Oni petas, postuli la senpagan Esperantan prospekton de la „Svisa Specimena Foiro“ en Basel, Gertergasse 30.

... La agentejo „Esperanto-Press“, praktike uzanta Esperanton en la servo de la tutmonda gazetaro, serĉas ĉie kunlaborantojn, kiuj estas pretaj regule traduki artikolojn kaj sendi ilin al nacilingvaj gazetoj. Skribu al: „Esperanto-Pre-s“ en Lausanne (Svislando), „St. Luce“, Petit Chêne.

„Esperanto-Press“

ET kaj IK estas oficiala organo de la gazeta agentejo „Esperanto-Press“, direktata de s-o H. Unger.

„Esperanto-Press“ estas tute neŭtrala, politike kaj religie. Sentence ĝi celas disvastigi novaĵojn „per Esperanto“. La novaĵoj, ĉi tie publikigitaj, estas senpage al la dispono de ĉiu, kiu volas traduki ilin en nacian lingvon kaj aperigi en gazetoj de sia urbo aŭ lando. Du kondiĉoj: ĉiam citu la agentejon „Esperanto-Press“ (tiu nomo estas serioza propagando de nia afero) kaj sendu 1 ekzempleron de ĉiu reprintsita artikolo al „Esperanto-Press“, Lausanne (Svislando), Vilao St. Luce, Petit Chêne.

Unua sukceso!

„Esperanto-Press“ disvastigis, dum la monatoj novembro—decembro 1922, informojn ankaŭ pri la „Delegitaro de Sirio kaj Palestino“, kiu ĉeestis la gravan Pacan Konferencon en Lausanne. La ĝenerala sekretario, princo Ĉekib Arslan, sendis al ni tiun leteron (france redaktitan):

Kara s-o Unger,
Vidante la baldaŭan finon de la „Konferenco por la Paco en Oriento“, mi ne volas forgesi, esprimi al vi mian plenan kontentecon koncerne la publikigan servon, kiun via agentejo „Esperanto-Press“ fari al nia delegitaro. Mi povas diri, ke, per viaj tutmondaj rilatoj, la ideoj de nia delegitaro trovis bonan lokon en la gazetaro de vere konsiderinda nombro de landoj. Ŝajnas al mi, ke tio estas tre praktika kaj konvinkiga pruvo por la valoro de la

lingvo „Esperanto“ en la Internacia vivo, kion mi ne forgesos diri al miaj kunpatriotoj.

Akceptu, kara sinjoro, ktp... (sig.) Emir Ĉekib Arslan, ĝen. sek.

Tiu dankesprimon nur malmulte trafas la direktoron de „Esperanto-Press“, ĉar estas liaj senlaciaj kunlaborantoj tra la tuta mondo, kiuj sukcesigas la ideon de la agentejo. Al ili, kiuj helpis pravi la praktikan utilon de nia lingvo, ni do sincere kaj varme dankas! Ke ili daŭre kunlaboru kun ni kaj plene sukcesigu nian entreprenon, utilan al nia komuna movado, — jen nia deziro kaj espero!

Elektra metaliza metodo.

La evoluado de la moderna tekniko celas al plejble vasta utiligo de la elektra forto. Laŭ informoj de la agentejo „Esperanto-Press“, tiun naturan vojon nun iras ankaŭ la konata eltrovaĵo de la svisa kemiisto M. U. Schoop en Zürich.

La Schoop'aj metalizado efektivigas per aparato, kiu havas la formon de pistolo. Metala drato enŝovas sin aŭtomate en la pistolon, fandiĝas en ĝia interno kaj per forta premo (3 atmo-

sferoj) estas jetata aŭ ŝprucata ekstere, en fluo da formo, por kovri la surfacon de la objekto metalizota. Dum, ĝisnun, la fando de la metala drato (plumbo, zinko, stano, kupro, aluminio ktp.) okazis per gasa flamo, tiu hejta fonto estas anstataŭigita per elektra forto.

Tiu moderna evoluigo de la Schoop'aj eltrovaĵoj necesigis tre grandajn ŝanĝojn en la konstruo de la ĝisnuna aparato, tiel, ke la „elektra metaliza metodo“ devas esti nomata: memstara, nova eltrovaĵo.

La elektra pistolo signifas ne nur kompletan revolucion de la metaliza tekniko: post nelonga tempo ĝi tre verŝajne estos nemankebla instrumento en la tutmonda industrio, kiu jam tre multe uzas la gasan aparaton.

Enketo.

Kunlaboru, ni petas.

La „Universala Esperanto-Asocio“, invitante por la Internacia Konferenco en Venecio, starigis „laborprogramon“ pri diversaj aferoj, forte interesantaj la konferencan.

Tragente malnovajn „Kronikojn“ de diversaj Esperantaj gazetoj, ni trovis tie tre interesajn informojn pri praktika aplikado de Esperanto, sed — ni ne sukcesis, kontrolante ilin!

Tial ni hodiaŭ resumas tiujn informojn kaj petas nian legantaron skribi al ni, ĉu tiuj informoj estas veraj. Se eble, oni aldonu detalojn kaj sendu almenaŭ 1 ekzempleron de la koncernaj presajoj.

Komercaj Ĉambroj, kiuj iam favoris, subvencis, instruis aŭ uzis Esperanton: Tacoma — Boise — San Francisco — Los Angeles — Washington — Bromberg — Kassel — Magdeburg — Sonneberg — Karlsruhe — Liegnitz — Dover Folkestone — Calais — Boulogne — Abbeville — Arras — Laval — Puy — Rennes — La Rochelle — Kraków — Sabadell — Saint Dizier.

Firmoj, pri kiuj oni iam raportis, ke ili uzas Esperanton praktike: Cunard-Line (Britio) — Pathé frères (Joinville-le Pont, Paris) — Toepfer & Sohn (Potsdam) — Clément Bayard (Paris) — Grands Magasins du Louvre (Paris) — Au Bon Marché (Paris) — Printemps (Paris) — Porzellanmanufaktur (Meissen) — Franziskaner Leisbräu (München) — Asekura societo „Friedrich Wilhelm“ (Berlin, Hannover) — Schichau-Werft (Danzig) — „The Colonial Mutual“ (Britio) — Emerson Piano Co. (Boston) — Sinn & Co. (Hagen i. W.) — Neuman & Co. (Dresden) — Neckerwerke A. G. (Esslingen) — Hengst (vinagra fabriko; Germanio, Württemberg) — Kreditreform (Leipzig) — Elektra fabriko S. A. (Budapest) — „Trianon“ (Reichenberg) — Auréole S. A. (Chaux-de-Fonds) — Eschebacher Werke (Dresden) — Heintze & Blankertz (Berlin) — Hispania S. A. (Nonduermas) — ktp., ktp.

Ĉu tiuj entreprenoj ankoraŭ favoras, uzas aŭ subtenas Esperanton? Se ne: kial ili ne plu okupiĝas pri Esperanto? Se jes: ĉu la firmoj estas kontentaj pri la funkciado (uzebleco) de la lingvo kaj pri la sukceso de la reklamo per Esperanto?

Respondojn oni adresu al: Redaktejo „Internacia Komercio“, Lausanne, Svisl. Hôtel-Pension St. Luce, Petit Chêne.

Ni scias ankaŭ...

... ke la „Internacia Kongreso de Oficistoj“ (1905, en London) esprimis la dezirojn, ke Esperanto estu oficiala lingvo de la sekvantaj kongresoj kaj ke la asocioj, partoprenintaj tiun Londonan kongreson, agu ĉe iliaj registaroj por enkonduko de Esperanto-instruado en lernejoj.

... ke la „Kongreso por Internacia Ekonomio“ (1905, en Mons) esprimis la dezirojn, ke Esperanto estu instruata en lernejoj.

Sed...

... mankas al ni akurataj kaj fidindaj informoj! Kiu sendos ilin al ni?

Internacia Komercio

Jarabono 5 svis. fk. Por abonantoj de „Esperanto Triumfonta“ senpage. Por fojroj kaj komercaj ĉambroj senpage laŭdeziro.

Anoncaprezpo po cm² 0.40 svis. fk. sur 1 a paĝo 0.50 fk., apud titolo 0.75 fk. Rabato laŭ interkonsento. Por malbonvalutaj landoj specialaj kondiĉoj.

Redaktisto: H. Unger, Hôtel-Pension St. Luce, Petit Chêne, Lausanne (Svisl.).

Manuskriptojn kaj korespondantojn por „Internacia Komercio“ oni direktu nur al la adreso de la redaktisto.

Plej bona okazo por konatiĝi kun la Svisa Merkato kaj por aĉeti bonkvalite. :: Postulu plenan informon aŭ Esperantan prospekton de:

SVISA SPECIMENA FOIRO
en Basel (Svislando), Gerbergasse 30.

SOCIETO POR KEMIA INDUSTRIO
en
BASEL (Svisl.)
Fondita 1864 :: Kapitalo: Fr. 20 000 000.—

Farboj kaj kemiaĵoj por tinkturado presado, blankigo kaj tanado.
Indigo.
Kemie-farmaciaj produktaĵoj.
Specialaj preparaĵoj: marko „Ciba“.
Fotografaj produktaĵoj: platoj, rivelaj substancoj kaj solvaĵoj.

Oficistoj de nia firma lernis Esperanton, por povu respondi al Esperantaj leteroj! Demandojn ni atendas nur de seriozaj importistoj!